// I N F O R M I L O

*Esperanta tradicio – kultura heredaĵo en Kroatio (Z-7298/2019)*

***2-2025(139) aprilo ĝis junio***

***Esperanto društvo Rijeka* Esperanto Societo Rijeka***

***Blaža Polića 2, 51000 RIJEKA, Hrvatska-Kroatio***

Tel.++385(0)(51)334-670 lunde de la 18a ĝis la 20a horo

Naslovi na mreži-retadresoj: rijeka.esperanto@gmail.com

IBAN: HR75 2402 0061 1002 1273 9,

**Prezidanto: Emil Hrvatin tel: 091 882 2986**

**Redaktoro: Dr.sc. Ana Alebić-Juretić, dipl.inĝ. tel.: 091 563 1634**

Rijeko, la 20-an de junio 2025

Estimataj gesamideanoj,

ni daŭrigas informi vin pri eventoj kiuj okazis en nia societo ekde aprilo 2025: la plej grava estas la 13a kunveno de kroataj esperantistoj en Slavonski Brod kaj inkludo de nia societo en laborejo pri kultura strategio de la urbo Rijeko.

## *13-a KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ*

La 13-a kongreso de kroataj esperantistoj okazis ekde la 16a ĝis la 18a de majo 2025 en Slavonski Brod. Kiel lastaj du fojoj, la kongreso estis organizita de DEC – Dokumenta esperanta centro de Đurđevac. Ĉirkaŭ kvindek esperantistoj aliĝis al kongreso. Slavonski brod estis elektita por la kongreso, ĉar tiu urbo havis gravan rolon en Esperanto-movado en la tempo inter la du mondmilitoj. Presisto Vilim Buk (Wilhem Buck, 1891-1962) estis eldonisto de *La Suda stelo*, tre grava Esperanto gazeto, kiu estis plurfoje malpermesita antaŭ la dua mondmilito. Krom la jara kongreso de KEL, dum kiu oni diskutis la situacion de Esperanto en Kroatio, kaj la planon por estonteco, vendredon la kongresanoj vizitis la tombon de Vilim Buk en la loka tombejo, kie ili renkontis liajn familianojn. Sekvontan tagon la programo okazis en domo de la fama verkistino por infanoj, Ivana Brlić-Mažuranić, en urbocentro. Josip Pleadin prelegis tie pri la vivo de Vilim Buk kaj liaj familianoj ĉeestis la eventon. Posttagmeze, ĉeeste de iuj familianoj, la tabulo dediĉita al Vilim Buk estis malkovrita en la urbocentro. La sabata programo enhavis ankaŭ la duan prelegon de Ana Alebić-Juretić pri *Esperanto kaj diktaturoj*, kaj prezentado de nova eldono de DEC, la libro de Ivana Brlić-Mažuranić por junuloj: *Jaša, la Dalmato, vicreĝo de Guĝerato* kaj du eldonoj de Esperanto-societo Split: Anela Borčić: *Garbeno, la malbona vento* kaj la poemaro de Luce Cetinić *Srcem ispisano/Elkore verkita*. Dimanĉo estis dediĉita al ekskurso al naturparko Jankovac. Ni



*KEL asembleo, je la 16a de majo 2025 en Slavonski brod (fotis: A. Alebić-Juretić)*




*Malkovro de la tabulo dediĉita al Vilim Buk en prezenco de kuzino. (fotis: A. Alebić-Juretić)*

ĝojis pro la bela programo en bele-ga urbo kaj esperas renkontiĝi la sekvontan jaron en Karlovac.

(*skribis: A. Alebić-Juretć*)

## *ESPERANTO SOCIETO RIJEKO AL LABOREJO PRI STRATEGIO DE KULTURO EN RIJEKO*

Dankon al Fako de kulturo de Rijeko, Esperanto societo estis invitita al labora renkontiĝo pri kultura strategio en la urbo. Reprezentanto de la Societo estis Ana Alebić-Juretić, kiu plurfoje aliĝis al konkurado pri kunfinancado de iuj kulturaj programoj. Laborejo okazis tri-foje: la unua, la 5a de marto, kaj la 8a kaj 9a de aprilo 2025, en la Infana domo. La gvidantoj estis Dr. Ana Žuvela kaj Dr. Dea Vidović el IRMO-Instituto pri evoluo kaj internaciaj rilatoj el Zagrebo. En la renkontiĝo partoprenis ĉirkaŭ 40 personoj de profesiaj kulturaj organizaĵoj, societoj kaj liberaj artistoj. Esperanto societo Rijeko estas dankema pro la invito al kunveno. Dum la unua renkontiĝo ni diskutadis pri SWOT-analizo (forteco-malforteco-ebleco-minaco) por kulturo en Rijeko. Kiel forteco kaj ankaŭ



*Laborejo pri kultura strategio de la urbo Rijeko*


*(fotis: A. Alebić-Juretić)*

ebleco oni deklaris plurkulturajn trajtojn de la urbo kun ĝiaj dialektoj kaj Esperanto. Dum du sekvintaj renkontiĝoj ni analizis plurajn prioritatojn de kulturo, kiel daŭropovo, kreado, teknologio, komunumo, edukado kaj kunlaboro. La laborejo finiĝis per difino de la nova vizio: *Rijeko estas haveno malfermata por kunlaboro kaj kreado de kulturoj, urbo kie evoluas libere kaj sisteme aŭdaca kaj daŭrigovola kulturo.* Ne ĉiuj estis kontentaj pri tiu difino, al kiu mankas tre grava komponanto - la heredaĵo.

*(skribis: Ana Alebić - Juretić)*

## *NIA MEMBRO EN* ***ESPERANTO POR MI***

En la lasta, 8-a volumo de *Esperanto por mi,* aperis nia membro Ana Alebić-Juretić. *Esperanto por mi* estas difinita kiel esperanta libro, redaktita de Helga Plötner kaj eldonita de Horizonto (Gunma, Japanio). Ĉiu numero enhavas 16 portretoj, kiujn la pentristino verkis per krajono. La portretojn akompanas po unupaĝa bio-grafieto, verkita de la portretitaj mem, kaj kolora reala foto. La portretitaj personoj alvenis el Kroatio, Koreio, Germanio, Japanio, Albanio, Pollando, Bulgario, Mek-




*Kovrilo de la lasta volumo de* Esperanto por mi. *Ĉiu volumo havas kovrilon en malsama koloro*

siko, Brazilo kaj unu mondcivitano. Dankegon al Helga Plötner kaj Jasuo Hori, eldonisto, por la bela eldono.

(*skribis: A. Alebić-Juretić***)**

## NOVAĴOJ EL LA KLUBO…

Ekde februaro 2025 Tihomir Lovrić guidas komencantan kurson por unu studento. Kelkfoje aperis iu por renovigi la scion de Esperanto kaj la partopreno en la kurso estas ĉiam malfermata. La kurso okazas lunde kaj daŭras du horojn. Lernomaterialoj uzataj estas Zagreba metodo, la teorio de Nakamura kaj reta materialoj.

*(skribis: Tihomir Lovrić )*

***RIMARKO***

**DUM LA SOMERO (01.07-08.09.2025) LA KLUBEJO ESTOS FERMITA.**
**ĜIS REVIDO EN SEPTEMBRO!**

Prezidanto: Emil Hrvatin

Lektoro: Elda Dörfler